# NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home


**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto: 2095-0141-41-2218001550**


**JANUARO/FEBRUARO 2016** **Nro. 106 (1/16)**





## TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao.

Danke al la entuziasma laboro de Pako, nia Prezidanto, ĉiuj el vi povas viziti, de antaŭ sufiĉe da tempo, la supran TTT-ejon de la E-Grupo de Bilbao.

En ĝi vi trovos interesajn informojn pri nia asocio kaj la tutan kolekton de la lastaj "Nia Ponto". Samtempe, vi trovos fotojn kaj historierojn de nia multjara Grupo.

Vizitu tiun TTT-ejon pere de la jena adreso:

https://sites.google.com/site/esperantobi/home

**LOKE ...**

## “FUNDACIÓN ESPERANTO” DENOVE MONHELPAS LA GRUPON DE BILBAO.

La Grupo de Bilbao devas denove danki al “Fundación Esperanto” kaj tre speciale al nia amiko Lorenzo Noguero pro subvencio, kiun Ĝi transdonis al ni pro instalo de lifto ĉe nia sidejo. Ĉi-foje la subvencio estis 300-eŭra. Felicxe temas pri la lasta jaro, ke ni petas subvencion por tiu kialo, tiel ke ni jam pagis la tutan sumon.

## Z-KUNVENO.




Kiel anoncite, la sabaton 12-an de decembro ni kunvenis cxe nia sidejo por festumi la naskigxtagon de la kreinto de Esperanto. Agrabla etoso kaj suficxe da partoprenantoj. Jen, sur la foto, parto de ili.

## NIA KRISTNASKA LOTERIO NE RICEVIS PREMION.




Unu jaron plian ni ricevis nenian premion en la tradicia kristnaska loterio. Sed ni ne resignas pri tio. Do, gxis la venonta jaro.


## CUOTAS DEL AÑO 2016.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este “Nia Ponto”. Y no olvidéis que las cuotas han cambiado:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

¡¡Muchas gracias por vuestra colaboración!!

## INTERVJUO AL AITOR ARANA EN “EL CORREO”.




La 24-an de januaro Aitor Arana estis intervjuata en “El Correo” (*“La Kuriero”*), la cxefa jxurnalo de Bilbao. Kialo estis la eldono de euska-Esperanta vortaro, kies autoro li estas.

Inter aliaj gxeneralajxoj pri Esperanto kaj gxia rolo en la nuna mondo, Aitor ankau parolas pri elstaras euskaj esperantistoj kiel Isaac López-Mendizabal au la fama socialisto de Eibar, Toribio Etxeberria.

Samtempe, Aitor anoncas la reeldonon de la lernolibro por euskoparolantoj, “Esperantoa Ikasgai”, unuafoje eldonita en 1990 kaj kiu elcxerpigxis antau kelkaj jaroj.

## SOCIARO.

Dum la jaro 2015, estis neniu novaligxinto al la E-grupo kaj unu homo petis eksigxon. Tiel je la fino de la jaro estis 53 asocianoj.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**30 jun-04 jul. 2016**. 75-a Hispana Kongreso. Herrera del Duque (Ekstremaduro).

**16-23. jul 2016**. 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław, Pollando.

**23-30 jul. 2016**. 101-a Universala Kongreso. Nitra (Slovakio).




**julio 2017**. Karavano al Seulo - Rusio-Koreio. Korea Esperanto-Asocio invitis UKon 102 de jaro 2017 en Seulo, Koreio. La Vojaĝo anoncas novan projekton, Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso. Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km/ 4,607 mejla), la plej longa fervoja itinero en la mondo. inf.: La Vojaĝo.



**H.E.F.**

## 75-a HISPANA KONGRESO.

(Herrera del Duque (Badajoz). 30 jun. / 04 jul. 2016)



Je la 23-a de februaro jam estis 102 aliĝintoj.

En la programo oni donos atenton al la diverseco ene de la regiono Ekstremaduro. Tio ankaŭ estos kialo por konigi Esperanton al la loĝantaro de la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj. La komarko fakte nomiĝas Siberia, kaj tiele oni klopodos ian ĉeeston de siberianoj en la kongreson, kio utilus kiel ĝemeligo de tiom apartaj popoloj.

Parto de la kulturaj programeroj fokusiĝos sur la celebrado de la firmiĝo de la Ibera Skolo de literaturo en Esperanto. Ni atendas la partoprenon de bona parto de tiu verkista grupo.

Ne mankos rilato al specifa lingvostato de la regiono, kaj konigado de diversaj aspektoj de la kulturo en la regiono. En tiuj datoj ekas la famkonata Festivalo de Klasika Teatro en Merido. Ni esperas doni specialan rolon al la teatro, akorde kun la tradicio de la lastaj hispanaj kongreso. Ankaŭ ne mankos muzikaj prezentadoj, prelegoj, atelieroj, ludoj, distraĵoj kaj vizitoj. Oni ekskursos al fama monaĥejo kaj tipa vilaĝo Guadalupe.

**TURISMA PROGRAMO KAJ POSTKONGRESO.**

Dum la kongreso, partoprenantoj havos la okazon koni kaj ĝui la urbon Herrera, mirindaĵon de la malnova popola arkitekturo, kun ties ĉefplaco, nobelaj domoj, palacoj, monaĥejoj kaj la trankvila vilaĝa etoso. Estas antaŭvidataj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵoj, inter kiuj surmonta Kastelo kaj diversaj lokoj de la lagaj pejzaĝoj. Ĉefa vizito estos al **Guadalupe**.

Oni programos turisman Postkongreson la 4-an de julio, por tiuj kiuj povos plilongigi sian ĉeeston en la regiono. Oni celos **Meridon**, **Trujillo** aŭ **Don Benito-Medellín**.

## Aliĝo al HEF por 2016.

Se vi tion deziras, jam eblas fariĝi membro de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) por la jaro 2016:
http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2016eo.pdf (E-o)
http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2016es.pdf (hispane)

La aliĝo estas malmultekosta kaj ecx havas **fiskajn avantaĝojn**: 20% de via aliĝo estas aŭtomate demetita de viaj impostoj en la tiel nomata IRPF.

## ELDONITA “BOHEMIAJ LUMOJ”.




Disponeblas jam la traduko al Esperanto de "Bohemiaj Lumoj", de Ramón María del Valle-Inclán, ĉefverko de la hispana teatro de la komenco de la 20-a jarcento. La libro estis tradukita de Miguel Fernández, kaj estas la numero 11 de la kolekto "Hispana Literaturo".

La disponeblo koincidas kun la 80-a datreveno de la forpaso de Valle.

Pliaj detaloj

http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/287-bohemiaj-lumoj-esperanto

http://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/286-luces-de-bohemia-esperanto*-valle-inclan*

Ankau en Faro de Vigo:
https://twitter.com/esperantoes/status/684385436215721984

*(José Antonio del Barrio. 05/01/2016)*

## 101 FILMETOJ SENPAGE.

La jutubejo de Hispana Esperanto-Federacio havas jam 466 membrojn, kaj… senpage disponigas al vi 101 filmeton: www.youtube.com/user/esesperanto

*(María Zocato. 15/02/2016)*

## PLIBONIGOJ EN LA RETEJO DE NIA BIBLIOTEKO.

Ĉu vi konas la retpaĝon de la **"Biblioteko Juan Régulo Pérez"** de Hispana Esperanto-Federacio?. Ĝi ĵus ricevis novan fasonon, do estas bona momento por ke vi esploru ĝian enhavon. Ne temas nur pri fizika biblioteko, sed pri vera katalogo de la kulturo en Esperanto.

Ĵetu rigardon en la adreso: http://www.esperanto.es/biblioteko

Krome, komence de januaro estis kreita la rikordo n-ro 5000 de la virtuala biblioteko, la *Bitoteko*. Temas pri numero de la iama revuo de la junulara sekcio de HEF, "HEJS-Juneco", kiu ekzistis dum al 60aj kaj 70aj jaroj. Multkiale interesa revueto.

Ĉiukaze enestas en nia arkivo pli ol 5000 dokumentoj en la datenbanko ĉar plurfoje okazas, ke la sama rikordo utilas por kolekteto da ili.

Esploru niajn trezorojn!

*(“La Bitbulteno”. HEF. Nro. 24. 21/02/2016)*

**TRA LA MONDO …**

## NOVA GXENERALA DIREKTORINO DE UEA.



Hodiau, la 4a de januaro, estis la unua labortago en Roterdamo de Veronika Poór, kiun ni elektis por sekvi Osmo-n kiel Gxenerala Direktoro.

Lau la kontrakta interkonsento kun Veronika, shi laboros ghis la fino de aprilo kiel Vica Ghenerala Direktoro, kaj ekde la 1-a de majo kiel plena Ghenerala Direktoro. Shi kaj Osmo proksime kunlaboros en la venontaj monatoj pri la transdono de scioj kaj respondecoj. (Mi estas tre felicha, ke ili jam sufiche multe kunlaboris en la autunaj monatoj, kiam Veronika restis plurajn semajnojn en Roterdamo.)

*(Mark Fettes. 05/01/2016)*

## NIA NOVA PROJEKTO: EKPAROLU!

Ni informas vin ke en la jaro 2016 **edukado.net** komencas grandan, novan projekton, kiun ni nomis **EKPAROLU!**
Celo de la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj.
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukode de komencintoj.
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon.

Baza ideo:

Ene de **edukado.net** ni kreus surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale treinitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn.

Legu pli ĉe la paĝo: **http://edukado.net/novajhoj?id=601**

*(G. Pirlot. 19/01/2016)*

## KONCENTREJOJ.

Jen projekto, kiu bezonas helpon por realiĝi. Temas pri eldonado de hispanlingva traduko de taglibro de prizonulo ĉe la koncentrejo Dachau: - http://www.verkami.com/projects/13624-goethe-en-dachau

Reliefigindas ke simila projekto, sed rilate al franciaj koncentrejoj, estas nun survoje. Ĉi-okaze temas pri esperantlingva versio de tekstoj skribitaj de la renoma esperantisto Grau Casas dum ties ĉeesto en diversaj franciaj koncentrejoj. Malbone konata paĝo el la historio, kiun ĉi verko helpos klarigi. La projekto estas grandioza. La proksimuma amplekso de la libro estos 700 paĝa, pro kio, eble, ties eldonado bezonos sin turni al simila financado-metodo. La plej laboriga parto el ĉi projekto jam estas realigita. Espereble do, ĝi, post nelonge, vidos la lumon.

*(SAT-en-Hispanio (SATEH). 09/01/2016)*

## **HEIDI EN ESPERANTO**.




Heidi de Johanna Spyri estas ĉefverko de la svisa literaturo aperinta unuan fojon en la jaro 1880 kaj intertempe tradukita al pli ol 50 lingvoj en totala eldonkvanto de pli ol 50 milionoj kaj multfoje filmigita.

Tamen ĝis nun la verko ne ekzistas en Esperanto. Tion nun la eldonejo Allsprachendienst Esperanto GmbH ŝanĝos. La 1-an de aprilo 2016 aperos la unua volumo de la fama evoluromano por infanoj kaj tiaj kiuj ŝatas infanojn, kiel subtitolas la plej multaj romanoj de Johanna Spyri, en la internacia lingvo sub la titolo "La migro- kaj lernojaroj de Heidi".

Heidi estas verko instrua pri la sorto de orfinfano el malriĉega lando (kio tiam Svislando estis), kiu estis forportita al riĉa feŭdburĝa familio en la tiama imperia urbo Frankfurto. La karakteroj de la libro estas eternaj kaj ĉiam aktualaj, kaj tio klarigas la daŭran sukceson de la libro. Ĝi estos nemalhavebla en ĉiu Esperanto-biblioteko!

Per via tuja antaŭmendo de la libro aperanta fine de marto vi certigas la aperigon ne nur de la unua volumo, sed ankaŭ de la planita dua volumo „Heidi povas apliki, kion ŝi lernis“, kies apero estas kondiĉe de la sukceso de la unua volumo antaŭvidita por majo 2016.  Jen la ligilo por mendi la libron:
http://informejo.com/heidi-auf-esperanto---heidi-en-esperanto.html

*(Didi Weidmann. 04/01/2016)*

## **STRANGAJXO**: “Dangxera homo”.

En youtube nun troveblas filmetoj (videoj) de blinda homo nomata **Idji Xuan**. En la filmeto "Esperanto kaj runoj", li montras tiun runon kiun uzis la nazia organizo SS. Li provas kontakti e-istojn, sed pluraj trovis liajn mesaĝojn strangaj kaj ne respondis.
Li ĉeestis la staĝon AŬTUNE 2015 en Greziljono kaj kondutis insulte, kverele, manipuleme.

Li aliĝis sub la nomo **Alain Schmitt** kun juna helpantino, loĝurbo F-54200 Toul.

Iu de li kontaktita e-isto enketis kaj trovis ke li estis guruo de eksa sekto Minh Vacma en F-57440 Algrange, kondamnita al prizonoj en Malto, poste 1 jaron en Francujo, pro mistrakto, kidnapo, mon-eldevigo.

**Estu do atentema,** se vi legas la nomon **Idji Xuan**

*(Berto Sxuman. 06/01/2016)*

## **Kiselman demisias pro kazo, okazo kaj kaoso**

La prezidanto de la Akademio de Esperanto, Christer Kiselman, anoncis ke li demisios la 15-an de decembro 2015. La anoncita kialo de la demisio estas lia nesukceso bridi kaosan retan disputon pri la vortoj kazo kaj okazo kaj entute funkciigi retan opini-interŝanĝon en la Akademio. Ŝajne kontribuis ankaŭ la malsukceso antaŭenigi proponon pri nova statuto.

*(“Libera Folio”. 01/02/2016)*

# UMBERTO ECO.



Oni parolis pri la forpaso (la 19an de februaro) de Umberto Eco. Tuj mi pensis pri interesa komento farita de li iam pri Esperanto... Jen reprodukto (esperante kaj hispane):

**UMBERTO ECO ree pri Esperanto**

"... Mi iom studis ĉiujn tiujn utopiojn pri kreado de lingvo perfekta aŭ de la origina, Adama lingvo, ĝis tiuj lingvoj kiujn oni nomas universalaj, kiel Esperanto, volapuko kaj aliaj, kiuj ne celas esti perfektaj lingvoj, sed helplingvoj. Kaj je tiu okazo mi eĉ studis la gramatikon de Esperanto por kompreni pri kio temas. Kaj mi venis al du konkludoj. Ĝi estas tre, tre bone farita lingvo. El lingvistika vidpunkto, ĝi vere sekvas admirindajn kriteriojn de [lingva] ekonomio kaj efikeco. Due, ĉiuj movadoj por internaciaj lingvoj fiaskis, sed ne [tiu de] Esperanto, kiu plu kunigas aron da homoj ĉie en la mondo, ĉar malantaŭ Esperanto estas iu ideo, idealo; mi celas ke amenhof ne nur konstruis lingvan objekton, sed malantaŭ tiu estis deo, [...] ideo de frateco, ideo pacisma, kaj tiu forto de idealo - pro kiu la esperantistoj eĉ estis persekutataj sub la naziismo kaj la stalinismo - konservas ankoraŭ la komunumon de la e-istoj. Oni ne povas diri ke ĝi fiaskis. Sed necesas diri unu aferon. La kialo pro kiu iu lingvo sukcesas, estas ĉiam nedifinebla." (H.Masson)

*El intervjuo al la radio Paris Première (27 feb. 1996)*
*Originalo aperinta en revuo Esperanto, majo 1996*

**UMBERTO ECO OTRA VEZ SOBRE EL ESPERANTO**

"... He estudiado un poco todas esas utopías sobre la creación de una lengua perfecta o desde la lengua original, la lengua de Adán, hasta las lenguas llamadas universales como el esperanto, el volapuk y otras, que no pretenden ser lenguas perfectas sino lenguas auxiliares. Y con este motivo, incluso he estudiado la gramática del esperanto para comprender de qué se trata. Y he llegado a dos conclusiones. Se trata de una lengua muy, muy bien hecha. Desde el punto de vista lingüístico, sigue en verdad unos criterios de economía y eficacia (lingüísticas) dignos de admiración. En segundo lugar, todos los movimientos en favor de lenguas internacionales han fracasado salvo el (del) esperanto, que va reuniendo un colectivo de personas en todas las partes del mundo, debido a que tras el esperanto late una cierta idea, un ideal; apunto que Zamenhof no sólo construyó un objeto lingüístico, sino que tras éste hay una idea (...), una idea de fraternidad, de pacifismo, y la fuerza de este ideal -por el que los esperantistas incluso han sido perseguidos bajo el nazismo y el estalinismo- conserva todavía la comunidad de los esperantistas. No se puede decir que haya fracasado. Pero hay que decir algo. El motivo por el que una lengua triunfa es siempre indefinible."

*De una entrevista en la radio Paris Première (27.febrero.1996)*
*Originalo aperinta en revuo ESPERANTO majo 1996, 1081 (5)*

Krome, ankau mi rekomendas alian amuzan artikolon de Renato Corsetti pri Umberto Eco ("La dua plej bela vespero en mia vivo", en revuo Esperanto, nov. 1993)

*(lorenzoesperanto@yahoo.es. 20/02/2016)*